

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS  
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL  
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE  
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE  
Peranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE Presbytère 54490 PIENNES

C.C.P. Association Catholique pour l' Esperanto 2324 93 N. ROUEN

==== la m<sup>o</sup>: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sumo: 30 F. ====

+++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre  
antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N<sup>o</sup> 158 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PID X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== SEPTEMBRO 1988 ====

+++++

## BILETO DE LA PREZIDANTO

Ces quelques mois d' été, le rythme de la vie transformé par les vacances, ont été pour beaucoup l' occasion de voyages, de découverte d' autres pays et d' autres peuples. Pour ceux qui ont le privilège de pouvoir s' exprimer dans une langue commune, ces rencontres peuvent s' enrichir de relations plus réelles, au niveau de l' amitié, des pensées, des idées.

Pour tous les espérantistes, l' événement majeur de cette période a été le Congrès Universel d' Espéranto. Dans la ville de Rotterdam se sont rencontrés des espérantistes du monde entier, venus de tous les horizons géographiques et culturels. Pour la 73<sup>ème</sup> fois, depuis le premier congrès de Boulogne-sur-Mer en 1905, cette manifestation se renouvelle, animée de toutes les activités humaines, intellectuelles, littéraires, scientifiques, professionnelles, démontrant toutes les ressources et les virtualités d' un langage capable de rapprocher dans une communauté harmonieuse des hommes si divers d' origine et de pensée.

Il faudra bien que vienne le temps où les instances internationales appelées de plus en plus à des rapports étroits, comprendront qu' une langue auxiliaire, neutre et universelle, doit s' imposer, hors des complications de tous ordres que crée la multiplicité des langues de travail.

L' Union Internationale Espérantiste Catholique, à laquelle se réfère notre association, est profondément attachée à la fidélité au Siège Apostolique, ainsi qu' au rapprochement de tous les chrétiens dans l' unité du Christ. Elle continue l' oeuvre de ceux qui ont vu dès le début de ce siècle, quelle richesse serait, pour l' Eglise universelle, ce moyen de communication au service de l' Evangile "jusqu' aux extrémités du monde".

Cela nous appelle à un réel effort, un engagement sérieux pour que le mouvement progresse, tant en nombre qu' en qualité, dans l' action individuelle et collective.

../...

Nous n' oublierons pas que notre démarche est d' ordre spirituel; par la prière, l' action, l' exemple, comme disciples du Christ, notre activité humaine doit être tournée vers la gloire de Dieu, tout progrès mis à son service. Placer l' espéranto dans cette perspective, c' est l' un des aspects de notre effort, le second étant de rendre sensible au monde espérantiste la présence du Christ en nous.

C' est dans ce sens que nous recevons les encouragements que les imitateurs de notre mouvement ont reçu, dès les débuts, de Sa Sainteté Pie X, le saint pape à qui nous demandons sa protection céleste et son patronage. Tel est notre regard vers l' avenir: apporter à l' Eglise d' aujourd' hui, pour les chrétiens de demain, une pierre dans la construction d' un monde plus uni, plus fraternel.

R. Cl. COLAS

RESUMO

La someraj libertempoj estas, por multaj esperantistoj okazo por amikaj renkontoj kun alilandaj samideanoj. Por multaj, la ĉefa evento de tiu periodo estis la 73-a Universala Kongreso, kiu okazis en la monato julio en Roterdamo. Tien venis multaj adeptoj de la Lingvo Internacia el ĉiuj horizontoj geografiaj kaj kulturaj. La plej diversaj medioj, intelektaj, literaturaj, sciencaj, profesiaj havis manifestaciojn ĉu fakajn, ĉu komunajn, en harmonia komunumo senlima.

Ĉu baldaŭ la internaciaj instancoj, devigataj al pli kaj pli da ĉiutagaj rilatoj konvinkigas, ke necesas la uzo de komuna lingvo, neŭtrala kaj universala?

La Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista "I.K.U.E." estas profunde ligita al la fideleco al la Papo, kaj al la movado por la unueco de la kristanoj. Jam de la komenco de la jarcento, ĝi proponis nian lingvon por la servo de la universala Eklezio. La klopodoj de ĉiuj devas strebi al tiu celo. Nia agado estas unue spirita: kiel disĉiploj de Kristo, ni volas, per Esperanto, labori por la regno de Dio. Tiaj estis la intencoj de niaj unuaj pioniroj, aprobitaj kaj kuraĝigitaj de la papo Pio la X-a, la sankta papo, kiun ni alvokas nun kiel patronon kaj protektanton. Ni direktu niajn klopodojn al la estonto, alportante ŝtonon al la konstruado de mondo pli unuigita, pli frata, pli pacigita.

R. Cl. C.

oo

MARIA, PATRINO DE LA SAVANTO

Kelkaj aspektoj de la doktrino, prezentitaj kaj pridiskutitaj dum niaj spiritaj ekzercoj en Lourdes (8-11/4/1988)

KIEL KRISTO ESTAS LA SAVANTO DE LA HOMARO?

Kristo estas la unika kaj tuta Savanto. Ne temas nur pri la individua kaj spirita savo, laŭ la malnova kantiko: "Mi havas nur unu animon, kium mi savu; antaŭ la eterna flamo mi volas ĝin gardi."

Tiu savanta agado de Kristo temas ankaŭ pri la kolektiva kaj multforma savo, t.e. la agado sur la sociaj, ekonomiaj, politikaj, ideologiaj strukturoj. Por redoni la historian, konkretan kaj kolektivan karakteron de la krista savo, oni anstataŭas ĝin per la pli kutima kaj klara, pli realisma kaj entutiganta vorto: la Liberigado. Fakte tiu vorto ebligas inkludi kaj la spiritan individuan liberigadon, kaj la multforman socian liberigadon.

Ambaŭ aspektoj estas komplementaj kaj necesaj. Se Kristo kaj ni, liaj gefratoj per la bapto kaj geagantoj, intencas nur forigi la personajn pekojn, la numaj malbonaj ekonomiaj strukturoj de la mondo daŭre malhelpos la praktikon de la kristanaj virtoj. Male, se la kristanoj intencas liberigi la mondon el la malbonaj strukturoj, sen plibonigi la konsciencojn, ili riskas konstrui "komunisman" societeton. Pri Kristo liberiganta kaj ĉiun homon el la peko, kaj la societeton el la malbonaj strukturoj, la ekskluziveco estas katastrofa, la kuŝiĝo alportas la esperatam sukceson.

KIU ESTAS LA ROLO DE LA PATRINO DE KRISTO EN LA HOMA SAVO?

Nur en la mistero de Kristo ni povas kompreni la misteron de Maria. La mistero de la enkarniĝo de la dia Verbo prilumas la misteron de lia patrino. Tiu doktrino estis prezentita de la Koncilo en Efezo en 431. Kaj la realeco de la Enkarniĝo trovas sian kvazaŭan plilongigon en la mistero de la Eklezio-Korpo de Kristo.

Laŭ papo Johano-Paŭlo II-a, en lia encikliko "Redemptoris Mater", la duobla ligilo, kiu unuigas la Patrino de Dio kun Kristo kaj kun la Eklezio havas historian signifon. Ĉi tie temas ne nur pri la historio de la Virgino-Patrino,

de la persona vojplano de ŝia fido kaj de la "plej bona parto", kium ŝi havas en la mistero de la savo, sed ankaŭ de la historio de la tuta popolo de Dio, de ĉiuj, kiuj partoprenas en la sama pilgrimado de la fido."

Kaj la Papo precizigas: "la pilgrimado de la fido montras la internan historion, kvazaŭ la historion de la animoj. Sed estas ankaŭ la historio de la homoj, submetitaj surtere al transira kardi stato, situantaj en la historia kadro

PRAKTIKAJ KONKLUDOJ

Por ludi sian gravan rolon en la savo de la homaro, ni homaranistaj kristanoj devas kontempli kaj imiti Kriston kaj lian patrinon. La riĉiga preĝo de la rozario povas helpi nin.

Unue, ĝi ne estas nura maria preĝo, sed samtempe kristana kaj maria. Laŭlonge de ĝiaj 15 dekoj, ĝi prezentas al ni la ĉefajn etapojn de la komuna savanta agado de Jesuo kaj Maria. Ni kontemplas ilin kaj petas la fortom agadi kun ili por la liberigado de la homaro. Samtempe, ni fariĝas pli kaj pli konsciaj pri tio, ke ni devas, tra la ĝojaj, doloraj kaj gloraj misteroj de la vivo de Jesuo, de Maria kaj de ni mem, savi la animojn, kaj ankaŭ barakti por plibonigi la sociajn strukturojn, kiam ili malhelpas la praktikon de la virto, de la feliĉa vivo. Ekzemple, ni devas aktive kaj kuraĝe agadi tutmonde kontraŭ la nehumanajn diktaturojn, la torturojn, la perforton, la militon, la rasismon, k.t.p. Por tion fari, ni havas la helpon de nia universala lingvo. Ĉu ni sufiĉe opinias, ke ni havas la kristanan kaj Marian devon senĉese disvastigi kaj uzi Esperanton, la lingvon de la liberigo? La universalan lingvon de la universala liberigo? La homaran lingvon de la homara liberigo?

HELPILOJ

Kiam iu ajn samideano deziras agi kaj kontribui al la modifo de la sociaj strukturoj, li ne estas sola, sed havas kun si multajn geamikojn pretajn informi lin kaj agi kun li. Ekzemple:

- 1) FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO La Houssaye-en-Brie 77610 Fontenay-Treigny.
- 2) ESPERO KATOLIKA Via Berni, 9 - I-00185 ROMA Italujo
- 3) ETNISMO, informilo pri etnaj problemoj. Eldonas kaj redaktas: Uwe Joachim Moritz, Im Rümerfeld 44, D-5180 ESCHWEILER (FRG). Jarabono: 10 GM, poŝt-ĝirkonto: 232612 G.
- 4) TUTMONDE, pacifista movado. Apartat 313, E-08220 TERRASSA Hispanujo.

LA SANKTA HOMO KAJ LA RIVERO

Sankta homo loĝis borde de rivero. Iutage, najbaro venis kurante por averti lin: "La fulmotondro muĝas almonte. La rivero okulmezure ŝveliĝas... Forlasu vian domon, kaj rifuĝu sur la altaĵojn." Sed la sankta homo ne obeis lin. "Mi konfidas je Dio. Li ne forlasos min."

La pluvo pliiĝis. Torento iĝis la rivero. La sankta homo supreniris sur la tegmenton, kaj denove ekpreĝis. Ŝipanoj, kiuj pasis, kriis al li, ke li saltu en ilian barkon. "Ne, ne, li diris, mi konfidas je Dio." Aliaj savontoj alvenis. Sed la sankta homo estis devigita rifuĝi supre de arbo. Li forpuŝis la etenditajn manojn.

La homoj estis apenaŭ forrintaj, kiam la arbo elradikiĝis. La sankta homo dronis.

Li alvenis en la paradizon. Koleregante, li senceremonie alparolis Dion: "Mi ne komprenas! Mi estas sankta homo, kaj vi ne protektis min!

- Kiel vi povas tiel paroli, diris Dio. Kaj via najbaro? Kaj la ŝipanoj? Kaj la savontoj? Ĉu vi opinias, ke mi sendis ilin por nenio?"

(Tiu filozofia rakonto apartenas al la sufismo, spirita branĉo de Islamo)

La parabolo invitas nin revizii la ideon, kiun ni havas pri la Providenco. Ni laŭmende atendas ĝin, kiam ĝi ĉeestas en ĉiu momento: en la aferoj de la vivo, la zorgemo kaj la vortoj de la proksimulo.

El paraña bulteno  
trad. G. Preux

oo

ĜOJIGA NOVAĴO

La 27-an de novembro, nia spirita konsilanto, P. Bourdon, Dominikano, festos siajn 60 jarojn de religia vivo. Fakte, li eldiris siajn unuajn votojn... en 1928!... Kun li, ni danku Dion.

LA ROZARIO

En sia libro "Le Rosaire" (Eld. Cerf), Patro Albert ENARD, Dominikano, alvokas al renovigo de la rozaria preĝo laŭ la orientiĝo de Koncilo Vatikano II. La Libro donas la genezon de la "Maria Psalmaro" kaj la disvolvadon de la modifoj ĝis la nuna "Rozario". Tre interesa kaj valora laboro!

En la antaŭparolo, M-ro PLATEAU, Ĉefepiskopo de Bourges, skribas: "Relokante la Rozarion, meditata kaj kontemplata, en la grandan tradicion de la Hora Liturgio tia, kia ĝi estis praktikata en Oriento kaj Okcidento ekde la 1-a jar-milo, Patro ENARD redonas al ĝi ĝian enradikadon biblian kaj liturgiam."

Per tiu vorto "Rozario", oni montras nur serion de 50 "Ave". Dominiko la kartusiano kunmetas 50 formulojn, kiujn oni nomas "klaŭzulojn" kaj kiuj resumas la ĉefajn eventojn de la vivo de Jesuo kaj Maria.

Jen la listo, kiun li proponas al ni. Ĉiufoje oni rediras malrapide la evangelian saluton unuigantan al la nomo de Jesuo la "klaŭzulon", poste oni longe paŭzas:

Saluton, grace favorita, Maria, La Sinjoro estas kun vi. Benata vi estas inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo...

1. Kiun, je la anĝela anonco, vi koncipis de la Sankta Spirito. Amen.
2. Kiun, post lia koncipiĝo, vi kunportis tra la montoj al Elizabeta.
3. Kiun vi naskis en ĝojo, restante ĉiam virga.
4. Kiun la anĝeloj laŭdis kantante "Gloria in excelsis" kaj kiun la paŝtistoj trovis en Bet-Leĥem.
5. Kiu estis cirkumcidata la okan tagon kaj nomata Jesuo.
6. Kiu estis respektigata kaj adorata de la Tri Magoj alportantaj donacoj.
7. Kiun vi alportis al la Templo en viaj patrinaj brakoj kaj prezentis al Dio lia Patro.
8. Kiun la maljunulo Simeono benis ricevante lin en siajn brakojn kaj kiun la vidvino Anna rekonis.
9. Kun kiu vi forkuris en Egiptujon, for de la vizaĝo de Herodo.
10. Kun kiu vi revenis en vian landon, revokata de la Anĝelo post sep jaroj.
11. Kiun vi perdis en Jerusalemo je la dekdua jaraĝo, kiun vi dolore serĉis dum tri tagoj, kaj kiun vi retrovis en la Templo.
12. Kiu ĉiutage kreskis en aĝo, graco kaj saĝo antaŭ Dio kaj la homoj.
13. Kiun Johano baptis en la Jordano kaj montris al ĉiuj, ke li estas la Ŝafido de Dio.
14. Kiu fastis en la dezerto dum 40 tagoj kaj kiun Satano trifoje tentis.
15. Kiu, en Kana de Galileo, ŝanĝis akvon en vinon.
16. Kiu anoncis la Regnon de la Ĉielo al la disĉiploj kunigitaj kaj al la mondo.
17. Kiu havigis la vidadon al la blinduloj, purigis la leprulojn, resanigis la paralizulojn kaj liberigis ĉiujn, kiuj estis premataj de Satano.
18. Kiu, antaŭ Petro, Jakobo kaj Johano, estis transfigurita sur la Sankta Monto.
19. Kies piedojn Maria-Magdalena lavis per siaj larmoj kaj sekigis per siaj haroj kaj oleoŝmiris per parfumo.
20. Kiu relevigis Lazaron, mortintan de kvar tagoj, kaj ankaŭ multe da mortintoj.
21. Kiu, la tagon de la Palmoj, sidante sur azeno, estis triumfe akceptata de la popolo.
22. Kiu, je sia lasta manĝo, fondis la kultindan Sakramenton de sia Korpo kaj de sia Sango.
23. Kiu eniris en la Ĝardenon kun siaj disĉiploj kaj, tie, fervore preĝante, sange ŝvitadis.
24. Kiu iris renkonte al siaj malamikoj kaj propravole fordonis sin en iliajn manojn.
25. Kiun la judaj reprezentantoj malmilde ligis kaj tiele kondukis al la Ĉefpastroj.
26. Kiun falsaj atestantoj akuzis, kaŝis lian vizaĝon, kraĉis sur lin, donis vangofrapojn kaj frapis per vergoj.
27. Kiun, antaŭ Pilato kaj Herodo, ili juĝis kiel krimulon indan je la morto sur Kruco.
28. Kiun, jam senvestigatan, Pilato kruele kaj longe skurĝigis.
29. Kiun la soldatoj kronis per dornoj, ofendomokis, fiadoris vestinte lin per ridinda vesto.

30. Kiun ili kondamnis al hontinda morto kaj kondukis al turmentmortig-  
ejo kun du aliaj krimuloj.

31. Kiu ili najlis per manoj kaj piedoj al la kruco kaj ofertis al li  
vinon aromigitan per mirho kaj miksitajn kun galo.

32. Kiu preĝis por siaj torturistoj dirante: "Patro, pardonu ilin, ĉar  
ili ne scias, kion ili faras."

33. Kiu diris al la krimulo, kiu estis dekstre de li: "vere mi diras al  
vi, hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo."

34. Kiu diris al vi, sia tre sankta patrino: "Virino, jen via filo", kaj  
al Johano: "Jen via patrino."

35. Kiu kriis: "Eloi, eloi, lama sabaŝtani?", t.e.: "Mia Dio, mia Dio,  
kial vi forlasis min?"

36. Kiu diris: "Ĉio estas finita!"

37. Kiu lastatempe diris: "Patro, en viajn manojn mi transdonas mian spi-  
riton."

38. Kiu suferis por ni, pekuloj, morton tre kruelan kaj tre sanktan. Al  
Dio estu danko!

39. Kies flankon soldato malfermis per sia lanco, kaj de kie eliris akvo  
kaj sango por la pardono de niaj pekoj.

40. Kies tre Sanktan Korpon la amikoj dekrucigis kaj metis, senviva, en  
tombon.

41. Kiun justuloj kaj sanktuloj enbalzamiginte ĝin per parfumo kaj en-  
volvinte en tolaĵon, entombigis.

42. Kies tombon judoj sigelfermis kaj lokis tie gardantaron.

43. Kies tre Sankta Animo malsupreniris al la infero por konsoli la  
sanktajn patriarkojn kaj ilin konduki kun si en la Paradizon.

44. Kiu, la trian tagon, releviĝis kaj nin ĝojigis per ĝojo neesprimebla.  
Haleluja!

45. Kiu, post la Releviĝo, ofte montriĝis al la disĉiploj kaj al la fi-  
deluloj por firmigi iliajn korojn en la sankta fido.

46. Kiu antaŭ ili, en via ĉeesto, supreniris en la Ĉielon por sidiĝi  
dekstre de la Patro.

47. Kiu, la tagon de Pentekosto, sendis el la Ĉielo al siaj fideluloj  
la Sanktan Spiriton, kiun li promesis al ili.

48. Kiu suprenprenis en la Ĉielon vin, sian tre mildan patrinon, lokis  
vin dekstren de li kaj vin glorie kronis.

49. Li degnu, pro via propeto, post la paso de tiu mizera vivo, ankaŭ  
preni nin, servantoj siaj kaj viaj, kaj nin loki en la reĝnon de Dio lia Patro.

50. Kiu kun la Patro kaj la Sankta Spirito, kaj vi, sia tre glora patr-  
ino, vivas kaj regas, Reĝo triumfanta kaj glora, en la jarcentoj de jarcentoj.  
Amen.

xx

### KOLOMBO, SIMBOL DE PAĈO ( daŭrigo)

Tamen post kelkaj tagoj, mia edzo anoncas, ke sur la ovo-paro jam sidas  
ne kolombino, sed kolombo. La edzo anstataŭis edzinon en afero ŝajne pure virina.  
Li sidas pacience kaj tute ne timas, ke aliaj flugiluloj lin primokos.

Ho, viroj-edzoj, kiuj timas kuiri por si almenaŭ ovon aŭ tason da teo  
dum en kuirejo estas alia homo, primeditu! Kolombo ne timas, ke iu lin priridos,  
kaj vi?...

Po kiom da horoj ili sidis sur la ovoj senŝanĝe, tion mi ne rimarkis.  
Multaj horoj en laborejo, nokta ripozo kaj multaj aliaj aferoj ne permesis, ke  
mi spektu ilin atente... Kiam mi alportas panerojn, tiam birdo forflugas, mi mal-  
aperas - ĝi revenas kaj bekmanĝas rapidege.

Sed foje mi rimarkis, ke matenmanĝas ne tiu, kiu tion jam perlaboris,  
sed tiu, kiu alvenas por ŝanĝo. La edzino forflugis por zorgi pri matenmanĝo mem.  
Ŝajnas, ke ŝi ankaŭ apartenas al tiu kolomba komunumo, kiun ĉiumatene nutradas  
iu maljunulineto, loĝanta ĉe la najbara strato. Ili matenmanĝas, kiam mi devas  
veturi en laborejon. Do ilin spekti mi povas nur sabate kaj dimanĉe. Vidas mi  
foje svarmon da kolomboj, flugantaj laŭ trotuaro norden. Tuj poste la sama svarmo  
ruliĝas jam suden. Tiu ĉi birdamaso, ŝajne, duonflugas, duonkuras kaj en la mezo  
marŝas avineto en bruna palto. Ŝi iras ne laŭ trotuaro, sed iom flanko de ĝi. Jen  
tuta birdaro kaj la virino haltis. Ŝi malfermis sian mansakon kaj ion elŝutis sur-  
terem. La kolomboj ekmanĝis ĝojplene. La virino bondeziris al ili agrablan apetit-  
on kaj jam ekpaŝis hejmen. Sed jen ŝi ekvidis iun fremdulon - eble kornikon -  
proksimiĝantan al la "tablo". Ŝi revenis, minacis al ĝi per pugno ĝis tiu ne in-  
vitita gasto forflugis. Tion mi vidis sabate. (daŭrigota)

\*

LOKO: Petit Séminaire 118, rue des Montapins 58000 NEVERS

KOTIZOJ: UNUOPULO/: 50 F; geedza paro: 80 F; infano ĝis 16-jara, blindulo, kriplulo, sacerdoto, religiul(in)o, alihandano, KELI-ano: senpage.

PAGOJ: Association Catholique Française pour l' Esperanto.

LIMDATO: 8-an de aprilo 1989.

PREZO: 130 F por unu tranoktado kaj tri manĝoj + 15 F por lavado de la littukoj.

\*

ALIGILO: aperos en la decembra numero kun pliaj detaloj.

XX

MEVQJ

Preter fenestro flugas la mevoj blankaj, malpezaj, senzorgaj, tute sem kaj bezonoj kaj devoj, sem ia penso pri morgaŭ.	malleviĝas al mara surfaco kun laŭtaj, akraj ĝojkrioj.
Ili flugas alte en vasta spaco, de libereco ebriaj,	Miraklon petas mi de la fato, ke plenumiĝu la revoj - eĉ se turmentas min la malsato - nur flugi kun blankaj mevoj.

A. APOLLO (8/6/1988)

XX

RECENZOJ

- Antaŭ nelonge aperis suplemento al la kantikaro kompilita de P. Degrelle kaj R. Bernard. Ĝi konsistas el 14 kantikoj, kun muziknotoj, tradukitaj de P. Degrelle, kaj tre bele multobligitaj de nia amiko R. Pons. Dank' al ĝi, ni povos agrebligi niajn kongresajn diservojn. Prezo: 10 F afrankite. Niaj membroj, kiuj ankoraŭ ne havas la kantikaron, povas ricevi la kompletan kontraŭ 50 F afrankite.
- Niaj litovaĝ samideanoj ĵus eldonis tre belan libron por infanoj (kaj aliaj!) "Koko kantisto kokerikisto", tre bele ilustritam, kun teksto en rima prozo. Ĝi perfekte taŭgas kiel donaco okaze de festo aŭ de datreveno. Prezo: 18 F + sendokostoj.  
Mendoj por ambaŭ verkoj: S-ino J. Vincent (v.p. 1) Pago post ricevo de fakturo

XX

DEZIRAS KORESPONDI

G-roj Ramos de Abreu. Av. Olegario José Guimarães, 494  
 CEP 94800 ALVORADA RS BRAZIL  
 (inter katolika medio kun Francoj)

XX

NIA MEMBRARO

Novaj membroj: 8) F-to SOL ARPE (Rhône); 9) S-ro BERTRAND (Nord)

Koran bonvenon al tiuj novaĝ amikoj.

XX

PACO NIA

Paco nia, kiu eĉ ne plu certas en Ĉielo, glorata estu cia nomo. Sed iĝu surtera "tereco" venu cia regno cia vivoforto estu festo sur tero jam antaŭ al Ĉielo. Jam hodiaŭ al ni donu destinon ĉiutagan, pardonu al niaj ofendoj sed estu mem de neniu plu ofendata. Nin ne lasu fali en la tenton de la SS dudek, del' perŝingoj de l' kokteloj Ĥemiaj,	silentigu alarm-sonorilojn forigu el niaj manoj la torturon al homfrato liberigu nin el malbono! Estas tiom jam por fari kaj refari por retrovi kaj konservi sian sanon. Estas tiom da sortbatoj, ĉu naturaj genetikaj, elementaj, akcidentaj. Polucioj riparendaj, por timigaj defendiloj detruendaj ni estas nun tro neperfektaj estas tiom da amsoifantoj por satigi!
--	--

de l' kokteloj bakteriaj,  
de l' bomboj neŭtronaj.  
Scienco, multigu morgaŭojn.

Paco estiĝu en niaj koroj,  
em miaj kapoj.  
Tutplaneda ĝi fariĝu.  
Tia ĝi estu.

Geneviève CHARPENTIER

oo

ĜAJ EL LA 73-a U.K. DE ESPERANTO

Ĝi okazis en la granda nederlanda haveno Roterdamo de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1988. Kunvenis 2300 homoj el sesdeko da landoj, inter ili bona grupo de Afrikanoj kaj multaj Azianoj.

Inter la diversaj programeroj elstaris la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato (I.K.U.), la tago de la lernejo, la tago de la paco kaj plej diversaj fakaj kunvenoj. Plej interesos la legantoj tiu de I.K.U.E., kiun vizitis kvindeko da kristanoj, sed neniu estrarano de la asocio, bedaŭrinde. Aŭdiĝis diversaj opinioj pri la ekumena diservo, okazinta dimanĉon posttagmeze en la granda kaj bela preĝejo S-ta Laŭrenco. Bonege preparis tiun ceremonion Pastorino Koopmans el Roterdamo, kun helpo de sia edzo kaj de sia unuenaskita filino. Ĉiu ĉeestanto ricevis la tekston de la tuta diservo kun la muziknotoj de la kantoj. Ĉar la orgeno unue ludis la koncernan melodion, estis facile poste kunkanti. Kune diservis kelkaj pastoroj kaj du pastroj, ambaŭ Francoj, nome P; Bourdon kaj Héroux. La komuna komunio per pano kaj vino estis aparte kortuŝa... sed ne plaĉis al ĉiuj. Ve! Ŝajnas, ke 80 jarojn post la morto de P. Peltier, iuj katolikoj ankoraŭ vivas en la Mezepoko...

J. V.

oo

NAJBARA HUNDO

Em ĝardeno mia regas la trankvilo,  
ĉiu verda planto petas kune ĝoji  
pro viviga milde varma suna brilo.

Jam komencis la najbara hundo boji.  
Ĝi je ferma fera rusta ĉeno sidas,  
pacience nur rigardas kaj atendas,  
kaj alvokas ĉiam, kiam min ekvidas,  
per bojado laŭta ĝi ĉagrene plendas.

Unufoje volis ĝi mastrinon sian  
de la iu fremda homo nur defendi,  
ĝi disŝiris la mantelon novan lian  
kaj nun devas ĉeno je la kolo pendii.  
Mi ne povas al alvoko kontraŭstari,  
devas nepre proksimiĝi kaj karesi,  
nure tion povas mi por hundo fari,  
ĉenojn proprajn ne kapablas mi forgesi.

Tiel ĝi vivetas, sen espera peno,  
kun la turmentantaj puloj kaj la kuloj,  
ĝis la fino sia kun eterna ĉeno,  
ĉiam kun riproĉo akra en okuloj.

Iel en ni ambaŭ ofte estis timo,  
kaj similis pro la ĉenoj nia sorto.  
Ĝi forpasis, kien iris la animo?  
Dormu nun, amiko el najbara korto.

A. APOLLO

( 15/8/1987 )

oo

KASISTINA ANGULO

Jam pasia 2/3 de la jaro; aperas la 3-a bulteno, kaj pli ol deko da anoj ankoraŭ ne renovigis sian abonon por 1988. Pridemandu vian konsciencon, ĉu forges emulojn! Ĉu vi trovas ĝusta, ke asocio senpage liveras al vi sufiĉe multekostan bultenon? Se vi ne plu interesiĝas, skribu, ke vi rezignas pri plua membreco, sed ne lasu la bonvolajn bultenistojn vane elspezi sian tempon kaj energion. Dankon.

TURISMO

Jus aperis nova numero de "Norvegujo", belege kolorilustrita, kum la necesaj mapoj, grafikoj kaj desegnaĵoj. Eldonis ĝin la Reĝa Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj en Oslo, kaj estas senpage havebla ĉe

Norvega Esperantista Ligo, Olof Schousv. 18, 0572 OSLO 5 NORVEGUJO.

Jen la enhavtabelo: lando kaj popolo, trafikado, homoj kaj medio, historio, reĝimo kaj ekstera politiko, ekonomio, kulturo, publika sano kaj sociaj bonoj, edukado kaj esplorado.

+++++

ENHAVO

- |                                   |                            |
|-----------------------------------|----------------------------|
| 1.2. Biletø de la prezidanto      | 6. FKEA-kongreso en Nevers |
| 2.3. Maria, patrino de la Savanto | Mevoj                      |
| 3. La sankta homo kaj la rivero   | Paco nia                   |
| 4.5. La Rozario                   | 7. Eñoj el la 73-a U.K.    |
| 5. Kolombo, simbolo de paco       | Najbara hundo              |

+++++

KOTIZTABELO 1988

IKUE kun "Espero Katolika"	100 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.	

-----

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo	30 F
Geedza paro	40 F
Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o	15 F
Bonfaranto	150 F
Dumviva membro	600 F

-----

UFE kun "Revue Française" kaj "Eº Actualités"	205 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro	200 F

Association Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

+++++

Dépôt légal: 3ème trimestre 1988	!! Polycopié par l' A. C. F. E.
C.P.P.A.P. nº 62 532.	!! Prieuré St-Martin
Directeur: René-Claude Colas	!! La Houssaye-en-Brie
Directeur-délégué:	!! 77610 FONTENAY TRESIGNY
René-Jean Marmou	!! FRANCE